

Kvara rendevuo didaktika - Paroli per kompreneblaj kaj memorigeblaj vortoj.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991 januaro 03.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo91-003/91-003-B-3-Claude-kaj-Andree-GACOND-Didakta-rendevuo-Paroli-per-kompreneblaj-kaj-memorigeblaj-vortoj.mp3>

CL.- Svisa Radio Internacia invitas vin hodiaŭ al kvara rendevuo didaktika kun gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND. Ni revenu al strukturŝanĝa ekzerco por esperanto-komencantoj per afiŝo, kiu proponas 10 formulojn por diri Ni parolas esperanton:

A.-

Ni parolas esperanton
Ni parolas en esperanto
Ni parolas esperante
Ni parolas esperantlingve
Ni parolas la lingvon esperanto
Ni parolas en la lingvo esperanto
Ni parolas la lingvon esperantan
Ni parolas en la lingvo esperanta
Ni parolas la esperantan lingvon
Ni parolas en la esperanta lingvo

CL.- Tiu fasko da formuloj ebligas utilajn komparojn kaj deduktojn. La prepozicio en anstataŭas la markon n. Ambaŭ estas indikiloj, kiuj atentigas, ke la vorto esperanto ne estas la subjekto de la frazo. Ankaŭ la finaĵo e ludas saman rolon: ĝi indikas, ke la koncerna vorto ne estas la subjekto. La adjektivo ankaŭ ricevas la markon n, kiam la nomo ĝin havas. Jen kelkaj konstatoj, kiujn la lernantoj povas fari per ekzameno de la afiŝo.

A.- Mi rimarkas ciferojn. Sub la pronomo ni videblas la nombro 1; sub la vorto parolas la nombro 0; sub la vorto esperanton la nombro 2.

CL.- La kodo de la koncerna formulo ni parolas esperanton estas do 102.

A.- Ha, mi komprenas. Kaj la kodo de la formulo ni parolas en esperanto estas 103 kaj tiu de la formulo ni parolas esperante estas 104.

CL.- Alia afiŝo alportas la sekreton de tiuj kodaj nombroj.

A.- Sub la titolo pens-veturilo aŭ pens-unuo ni vidas internon de rakedo aŭ de aviadilo. Antaŭe sidas la piloto. Lia seĝo havas la numeron 1. En alia ejo por nepilotoj troviĝas vico da seĝoj kun la numeroj 2, 3, 4 kaj 5. La valizo de la pasaĝero, kiu sidas sur la dua seĝo, surhavas la literon n. Tiu, kiu sidas sur la seĝo tria, tenas korbon kun amaso da prepozicioj: al, en, sur, sub, laŭ, ktp. Sur la kvara seĝo la pasaĝero havas sakon kun la litero e. Fine sur la kvina seĝo la pasaĝero tenas nenion.

CL.- Jen bona priskribo de la afiŝa desegno. Sed diru ankaŭ kelkajn vortojn pri la motoro de la spac-ŝipo.

A.- Ha jes, el la motoro eliras la verbaj finaĵoj en netradicia vico: us, os, as, as, is, u, i. Kial dufoje as?

Cl.- Ĉar la finaĵo as ludas du malsimilajn rolojn. Ĝi estas ne nur la marko de la nuno, sed ankaŭ tiu de la ĉiamo.

A.- Mi neniam aŭdis paroli pri tio.

Cl.- Vi pravas. Mi ne konas lernolibron, kiu instruas tion. Tamen estas tiel. Esperanto distingas inter la nuno kaj la ĉiamo. Kiam mi raportas en is-forma teksto pri okazintaĵo, se mi devas menciigi ĝeneralajn, mi devas forlasi la is-markon profite al as, la marko de la ĉiamo. Mi donu ekzemplon. Pasintsemajne mi feris en Berno.

A.- Lasu min daŭrigi : Mi vizitis tre riĉan artmuzeon kaj ankaŭ la federacian parlamentejon. Kiel vi scias, Berno estas la ĉefurbo de Svislando. Mi promenis en la malnova urbo, admiris ĝian mirindan stil-unuecon. Mi iris al la urso. Kaj mi lernis, ke la ursoj estas la simbolo de la urbo. Mi eniris restoracion kaj mendis fonduon, kiu estis bonega. Fonduo estas svisa specialaĵo.

Cl.- Vi bonege komprenis la regulon. Kial ne tuj komprenigi ĝin al la lernantoj, ĉar al tiu as de la ĉiamo paralelas la sufiksoj anto kaj ato. Ĉu vi estas skianto?

A.- Jes !

Cl.- Vi respondis *jes*, kvankam vi ne estas skianta en la nuna momento. Temis pri la ĉiamo. Sed ni revenu al nia piloto kaj al liaj pasaĝeroj, kiuj reprezentas la diversajn funkciojn de vorto en pens-unuo.

A.- Ha, mi komprenas. Vi simboligas la frazelementojn: la subjekton per la piloto sidanta sur la unua seĝo. Tial en la frazo ni parolas esperanton sub la vorto ni, kiu estas la subjekto, vi metis la ciferon 1. La pasaĝero, kiu sidas sur la dua seĝo tenas valizon kun la litero n. Sub la n de la vorto esperanton troviĝas la cifero 2.

Cl.- Kiam ni parolas, ni veturigas niajn pensojn de nia cerbo al tiu de la aliaj. Ĉiu penso similas al veturilo. Pro tio mi ŝatas la bildon de pens-veturilo, kiun mi ankaŭ nomas pens-unuo. En la tradicia grek-latina terminologio oni diras propozicio.

A.- Jen tipa vorto gramatika, kiun mi neniam bone komprenis.

Cl.- Tiel estas por multaj aliaj grek-latinaj terminoj. Ilin la lernantoj malfacile asimilas. Pro tio mi preferas uzi terminojn pli kompreneblajn aŭ kelkajn kodajn nombrojn, kiujn ĉiu povas facile asimili. Mi ne diras, ke tiuj vortoj aŭ nombroj devus anstataŭi la klasikan terminaron gramatikan, kiun ni trovas en bazaj verkoj kiel PAG kaj PIV. Oni havu nur efemeran helpan rolon didaktikan pere de ili.

A.- Almenaŭ mi reagas pozitive al la vorto pens-unuo, kiu havas signifon respondan al ĝia gramatika rolo, dum la vorto propozicio pensigas al io alia, ol pens-unuo, al *propono*, ekzemple.

Cl.- Ni daŭrigu. Pens-unuo entenas ĉef- aŭ kern-vorton, kiun m koda per la nombro 0. En esperanto-teksto eĉ tutkomencanto facile trovas la kernvortojn de la pens-unuoj, ĉar ilin karakterizas la markoj us, os, as, is, u aŭ i,

A.- kiuj eliras el la motoro de la pens-veturilo de la aŝo. Kial vi donis la nombron 0 al la kernvorto?

Cl.- La motoro ne sidas sur seĝo, mi respondus al infano, por komprenigi, ke oni devas distingi inter du malsimilaj niveloj da nocioj. La motoro bone simbolas la rolon de la kernvorto. De ĝi dependas la dinamismo de la pensunuoj. Ĝi plenumas pli malpli motoran funkcion. Por la aliaj funkcioj la bildo de spacŝipo favoras la distingon inter la seĝoj pilota kaj nepilotaj, inter 5 funkcioj.

A.- Kaj viaj ekzemploj klare montras, ke en esperanto oni indikas per videblaj markoj la nepilotajn funkciojn.

Cl.- Kaj ke saman nocion nepilotan oni povas esprimi plurmaniere: ĉu per la marko n, kies koda nombro estas 2, ĉu per prepozicio, koda nombro 3, ĉu fine per la finaĵo e, koda nombro 4. Ni parolas esperanton, en esperanto, esperante. Tiu plureco estas karakterizaĵo de esperanto kaj estas bone, ke la lernantoj tuj konsciu pri ĝi kaj ekzercu ĝin ekde la komenco de esperanto-kurso. La uzo de kodaj nombroj estas tre granda didaktika helpo. Ili konkretigas gramatikajn fenomenojn, kiujn ni ne bezonas priskribi per vortoj. Pri tio ni reparolos en la venonta semajno.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Se tiu rendezvuo didaktika kun Claude kaj Andrée GACOND vin interesis, vi povas skribi, por peti fotokopion de tiu disaŭdigo. Ni memorigas la adreson: Svisa Radio Internacia, CH-3000 BERN 15, Svislando.

Ĝis reaŭdo!